

esperantoUSA

The ELNA

Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

1990(6)

Making News This Issue

Pen-Pal Politeness

When you decide to start corresponding with Esperantists in other countries, there are certain simple rules you should follow. Editor Don Harlow illustrates some of these with an actual case study in this issue's editorial.

See Page 2

Ĝis!

Mark Stephens, Director of the Central Office for almost four years, bids farewell in this issue.

See Page 5

Esperanto Activities Abroad

Yosimi Umeda, long-time ELNA member and past Vice-President of UEA, discusses the progress of Esperanto in Asia and Eurocentrism in the Esperanto movement in a July speech given at Kioto, Japan.

See Page 7

In This Issue:

Presentation at Cuernavaca 4

Presidential Thanks to Outgoing ELNA Officers 6

Review: Haendel's *Messiah* in Esperanto 13

And Much, Much More to
Delight and Inform You!

New Courses

ELNA Educational Activities

by Dorothy Holland-Kaupp

[Dorothy Holland-Kaupp is ELNA's
Commissioner for Education.]

ELNA CORRESPONDENCE COURSES

For ELNA members who have no nearby Esperanto group or class, ELNA has a series of correspondence courses. Until recently, they consisted of the following three courses:

Basic (Baza): Textbook *Junul-Kurso*, 20 lessons, with two sets of exercises.

Intermediate (*Mezgrada*): Textbook *Step in Esperanto* by Montague C. Butler; 61 lessons, one workbook.

Advanced (*Progresiga*): Textbook *Paŝoj al Plena Posedo* by William Auld

(written exercises with each of the 30 chapters).

This year the following four completely new courses are being prepared. The first two are already available. All have accompanying cassettes so that speaking and listening skills can be developed much more extensively than with the previous courses.

Level 1: Textbook *Jen Nia Mondo I* (with a cassette of the dialogs; 12 lessons; fee \$35)

Level 2: Textbook *Jen Nia Mondo II* (with a cassette of the dialogs; 13 lessons; fee \$40)

*Level 3: Textbook *Ni Lernu Plu* by Violin Oljanov (accompanying cassette; fee T.B.A.)

*Level 4: Textbook *Al Perfektigo* by

Continued on page 10

MI SERĈAS GVIDANTOJN POR LA DU NOVAJ PERKORESPONDAJ KURSOJ...

...kies lernolibroj estas *Jen Nia Mondo I* kaj *Jen Nia Mondo II*. Tiu gvidanto devus

- (a) esti esperantisto;
- (b) bone prononci la lingvon;
- (c) esti respondema kaj respondeca;
- (d) kapabli respondi sonbende kaj skribe.

Se vi estas tia homo, aŭ konas tian, bonvolu kontakti s-inon Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara CA 93111-2521, tel. 805-967-5241. Antaŭdankon!

LASTAJ DECIDOJ DE LA ESTRARO

1) Nomas s-ron William R. Harmon Komisiito por la Centra Oficejo ĝis la 31a de majo 1991;

2) Akceptas la inviton de la Esperanto-Societo de la Karolinoj kaj Virginio okazigi la 39an Jarkongreson de ELNA (1991) en la regiono Raleigh-Durham-Chapel Hill en Norda Karolino.

EDITORIAL

SIMPLE POLITENESS

Most Esperanto magazines contain a column generally titled "Deziraro korespondi" or "Korespondi deziraro." In *Esperanto U.S.A.* we call it "Volas Korespondi..." I have talked about Esperanto correspondence before (see, for example, last issue's editorial). I have not, however, mentioned some of the problems involved with such correspondence, and perhaps it's time for me to do so.

The triggering factor for last issue's Editorial was a request for help from an Esperantist in Sverdlovsk with about a thousand new young Esperanto students. Hopefully, several U.S. Esperantists will contact him. Hopefully, none of them will make any really severe mistakes in such contacts.

I use the term "severe" advisedly. Esperantists in general tend to grant far more leeway for ordinary social blunders than do other people, simply because they quickly come to realize that other peoples have other ways of doing things. It is, in fact, possible under some circumstances to get away with some really outrageous *faux pas* because those present attribute the individual's behavior not to his incredibly bad manners but to his cultural background.

Nevertheless, there are some things that should not be done, and this is true in correspondence, as well.

Some weeks ago I received a very hurt and angry letter from one Javad Banisaid, an Esperantist in Iran. Mr. Banisaid had earlier requested that his name appear in our "Volas Korespondi..." column, and I was glad to oblige him. It duly appeared, but the results were not to his liking; he insisted that I "remove his name from our list"—which was, of course, not possible, since we have no list—only the original column in which his request appeared.

I asked Mr. Banisaid to send me the letter he received that caused his problem, and he was kind enough to oblige. When I saw it, I immediately sympathized with his anger. It was not, in fact, a letter; it was two pages of propaganda material (in English!) for what is apparently an eccentric branch of the Baha'i religion.

No, I'm not about to launch an attack on the Baha'is. The Baha'i religion is one of

the few that takes the question of a world language seriously, and although the Universal House of Justice has never specified which language should be the future world language, Esperanto is well-thought-of among Baha'is. Furthermore, Baha'i informational material is generally well-written, low-key, and very nicely produced. I have known a number of Baha'i Esperantists, and I cannot imagine any of them committing any of the several blunders displayed by this particular mis-sive.

Well, every religion has to have its "black sheep" offshoots. From the not particularly coherent material sent to Mr. Banisaid, I gather that this one is some sort of Baha'i equivalent of "Jews for Jesus"—a not particularly effective or attractive attempt to mix Baha'i with Christianity. Whatever, it is certainly not the sort of material to send to an individual in a Fundamentalist Moslem country whose people are for the most part honestly devout, and whose government may not be particularly attentive to the privacy of the individual.

Mr. Banisaid's would-be correspondent (if he or she ever had any intentions of corresponding) violated at least four fundamental rules. Let me reiterate them for you:

(1) Any individual advertising in our "Volas Korespondi..." column wants to correspond in Esperanto. Unless you see an indication that this person is ready to correspond in some other language as well (and there are some few of these), you should always write your letters in Esperanto. Writing in English is a most stringent no-no. The material sent to Mr. Banisaid was exclusively in English; the only relationship to Esperanto was that the name and address of a very well-known Esperantist appeared, certainly without her knowledge or permission, in a list on the second page.

(2) An initial letter should be personal, about you and your environment. A correspondence requestor wants correspondence, not propaganda of any sort whatsoever. In this case, the material was strictly tendentious, printed rather than personally prepared.

(3) Under any circumstances whatsoever, it is not particularly polite to leap into a political or religious argument with a just-met chance acquaintance. Such things should wait for the relationship between the two individuals to develop to the point at which they can feel comfortable about such arguments. Never fear, that time will come. Religion and politics, along with sex (and, among Esperantists, Esperanto), are two of the most interesting topics that two people can discuss, and sooner or later any correspondence will turn in that direction. The letter sent to Mr. Banisaid was strictly religious in nature.

(4) Never, ever, ever take a chance on causing gratuitous harm to the Esperanto movement or, more particularly, to any individual, Esperantist or not. The sort of material sent to Mr. Banisaid could, in some countries—I do not care to state unequivocally that Iran may be one of these—lead to social or professional ostracism, or even physical punishment.

I do not want to suggest that Esperantists should not have ideas of their own, religious or otherwise, nor that they should not use the language to promote those ideas. There are Catholic and Protestant Esperanto organizations that not only work to convince their co-religionists to learn and use Esperanto, but also promote Catholicism and Protestantism respectively among Esperantists. Oomoto in Japan has interfaced very effectively with the Esperanto movement for many years, and the Baha'is themselves have used Esperanto to good effect (there is also a Baha'i Esperanto League). Others, for instance the Seventh Day Adventists and the Latter Day Saints, have occasionally used Esperanto to promote their beliefs. So far as I know, all this activity has been carried out in ways that would cause no difficulties for individual Esperantists, nor offend them in any way.

What I do want to suggest is that Esperantists who want to establish friendships with Esperantists in other countries think, before doing anything controversial, what the reaction at the far end is likely to be. If you have any doubts, remember: simple politeness should solve all your problems.

Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

An English magazine, *World of Interiors* (June, 1990), includes an article on the still extant home on the French-Italian border of 19th century British botanist and apparent polymath Clarence Bicknell. The article mentions Bicknell's interest in Esperanto, and several of the accompanying photos show the Esperanto proverbs which he used as part of the house's decor. (The article does not mention that Bicknell is the oldest Esperantist poet to appear in the latest edition of *Esperanta Antologio*.) (sent by Bob Mason)

Earl Shorris, in an article "In Search of the Latino Writer" in The New York, NY, *Times* Book Review section (July 15, 1990), mentions Esperanto as an interest of his father-in-law Ernesto Sasson. (sent

by Mike Jones)

While poring over a pamphlet from the Internal Revenue Service, television actress *Roseanne* Barr (August 21, 1990) is reported to have asked her TV husband Dan in what language this pamphlet was written. His reply: "Fiduciary Esperanto!" We all know, of course, that an IRS pamphlet written in Esperanto would be more easily comprehensible even to non-Esperantists... (noted by Cynthia Libby)

The English-language magazine *International Affairs* (1990 #6), published in Moscow, USSR, contains a nine-page article by Justice Keppel Enderby, a member of Australia's Judges' Chamber of the Supreme Court, on "Is an Interna-

tional Language a Practical Solution?" Justice Enderby goes into great detail about the long and painful history of linguistic hegemony, and then gives an eloquent plea for Esperanto as a solution. (sent by A. J. Weiner)

Baedeker's *Guide to Israel* is reported to contain a photo of a church with the Lord's Prayer in Esperanto on an outside wall. (reported by Marquis Crocker)

In his new book *The Mother Tongue*, a description of the history of the English language, author Bill Bryson refers several times to Esperanto, mentioning its persecution by "Hitler and Mussolini" and the Distributed Language Translation project in the Netherlands.

ĈU VI ESTAS KELNASKANO

de John Mathews

[John Mathews de Sacramento, CA, estas la ELNA Komisiito pri Servaj Klubo, kaj la instiga forto malantaŭ la kreo de la Esperanlingva Tostmastra Klubo en San Francisco.]

Iu ajn esperantisto povas partopreni la aferon de la Komisiono de ELNA pri Servaj Klubo (KELNASKO), en kiu "KELNASK-ano" penadas plivastigi Esperanton inter la anoj de la tiel nomataj "internaciaj" organizoj de Usono. La strategio de la penado konsistas el du partoj. Unue, la laboro de dediĉita(j) esperantisto(j) kiu(j) havas altan postenon en la organizo kaj faras proponon ĉe tiu nivelo, ke la organizo rekonu Esperanton kiel internacian lingvon. Due, la laboro de diversaj esperantistoj ĉie atentigi pri Esperanto la anojn de la organizo ĉe la loka nivelo. La logiko malantaŭ la strategio estas, ke la decidfarantoj de la organizo aŭskultos la proponon nur kiam ili aŭdas pri la afero de multaj lokaj anoj de la organizo.

Du ekzemploj de la penado ekzistas. Unue, antaŭ kelkaj jaroj s-ro Clark Pyfer, longtempa esperantisto de East Helena, Montano, kaj altranga Kiwanisano, sukcesis adoptigi ĉe la ĉeestantoj de jarkunveno de Kiwanis International rezolucion pri la

taŭgeco de Esperanto por la antaŭenigo de internacia komprenado. Sed sekvis furoro inter Kiwanisanoj pri la afero, sub gvidado de kontraŭulo de la ideo. Ŝajnas, ke la problemoj estas, ke ne multaj lokaj Kiwanisanoj sciis pri Esperanto. Do, la Komisiono pri Servaj Klubo proponas, ke esperantistoj ĉie aliru lokajn Kiwanis-klubojn por proponi programon pri Esperanto. Ni aparte sugestis, ke la programo konsistu el montrado de la televidbendo *The World of Esperanto with Steve Allen* (havebla ĉe ELNA) kun diskuto de Esperanto post la montrado. Se iun jaron estontece oni faros alian similan proponon, ĝi havos pli da ŝanco de sukceso se multaj lokaj Kiwanisanoj subtenos ĝin.

La alia ekzemplo konsistas el uzo de la programo por la lernado de publikaj paroladoj de *Toastmasters International* por la plibonigo de la parolado de Esperanto. Jam ekzistas la *Esperanto Language Toastmasters Club* de San Francisco, kiu uzas nur Esperanton en siaj programoj kaj kies anoj atestos pri la valoro de la Tostmastra programo por tiu celo. Aldone, por fari bonan impreson je aŭskultantaro, ekzemple *Kiwanis* kunveno, oni devas havi trejnadon pri publika parolado. Partoprenado en iu ajn Tostmastra Klubo provizos tion. Plue,

partoprenado en la *Esperanto Language Toastmasters Club* permesos, ke esperantistoj povos paroli kiel *Toastmaster* al *Toastmaster*.

Kelkaj el la anoj ankaŭ penadas interesigi aliajn Tostmastrojn pri Esperanto, kun iom da sukceso. Ili vizitas aliajn klubojn kaj anoncas sin mem kiel *Esperanto Toastmaster*. Tiel la demando leviĝas: "What is Esperanto?" Jen ŝanco plivastigi Esperanton inter anoj de alia t.n. "internacia" organizo.

Longtempa celo de tiu ĉi penado estas la inkluzivo de Esperanto inter la lingvoj, en kiuj *Toastmasters International* eldonas siajn materialojn. Tio okazos nur kiam multaj Tostmastroj scios pri Esperanto kaj rekonos ĝian valoron. Tiam, altranga Esperanto-Tostmastro (ni esperas havi iam tian ulon) povos fari proponon al la decidfarantoj de *Toastmasters International*, kiu aŭskultos ĉar kelkaj estraranoj jam estos aŭdintaj pri la propono diversloke en Tostmastrujo.

Vi povas vidi, ke la programo de la KELNASKO estas ege longtempa afero. Sed memoru, "...eĉ guto malgranda..." Do iĝu KELNASK-ano.

Pli da informoj pri la programo haveblas ĉe John Mathews, P.O. Box 60860, Sacramento, CA 95860.



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

ARIZONA

Pasintjare okazadis Esperanto-kursoj en norda Phoenix. Ĉiusemajne la kursojn partoprenis plejparte Bahaaj gestudentoj. La kursojn instruis Angelina Taremi kaj William O'Ryan—ili ambaŭ estas la ĉefaj motoroj de la loka vigla Esperanto-vivo, ilia loĝejo estas vera Esperantujo. En aŭgusto ekaperis la dulingva, tre informriĉa monata novaĵbulteno, *Arizona Stelo*, kiu laŭ la raportinto estas unu el la plej bonaj Esperantaj periodaj eldonaĵoj en Usono. En la lastaj monatoj oni ankaŭ gastigis diversnacionojn el Hungario, Koreio, ktp. Oni aktivis kaj viglas ĉe la grandega loka ŝtata universitato kaj ankaŭ ĉe aliaj lokoj.

Attila Magyar

CALIFORNIA

La 25an de julio grupo de esperantistoj el la golfa regiono paroladis pri Esperanto ĉe la Centro por Maturuloj en Fairfield, CA. Partoprenis Angela Harlow, Prezidanto de ELNA; Don Harlow, Redaktoro de *Esperanto U.S.A.*; Cynthia Libby, Prezidanto de la Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj; kaj Qian Minqi, Vicprofesorino de la Angla kaj Esperanto ĉe Orient-Ĉinia Normala Universitato. Rezultis artikolo pri Esperanto en loka gazeto.

Don Harlow

Los Angeles-regionaj esperantistoj Leah Goldberg, Pauline Ledeer, kaj Haynes kaj Ede Hendee gastigis internacian lunĉon je sabato, la 2a de junio, 1990 ĉe la restoracio Good Earth en Pasadena, kun gastoj de Pollando kaj Ĉinio. Eva Heine estas juna ĵurnalistino, kiu laboras en la Kultura Fako de Pola Radio en Varsovio. Zhou Yue Quan (usona nomo "Joseph"), profesoro de la angla lingvo el Ŝanhajo, estas postdiploma studento ĉe Azusa Pacific. Ankaŭ ĉeestis lia edzino Mehgi kaj ilia kvinjara filino Soo, kiu lastatempe alvenis de Ŝanhajo.

Esperanto Association of Los Angeles Newsletter, 1990(8)

Dum kelkaj tagoj en aŭgusto Prof. David Jordan de la Esperanto-Klubo de San Diego gastigis Istvan Ertl el Budapeŝto, Hungario, gimnazia instruisto pri fremdaj lingvoj kaj sperta esperantisto. Josef Trojan, el Prago, Ĉeĥoslovakio, antaŭa vizitinto en la klubo en San Diego, lastatempe sendis salutojn al ĉiuj sandiegaj esperantistoj kaj invitis ilin viziti lin en lia lando. En sia klubo li donis prelegeton pri sia restado en San Diego kaj en aliaj usonaj lokoj.

Novajletero de la Esperanto-Klubo de San Diego, septembro 1990

NOVJORKO

En septembro aperis provnumero de nova bulteno de la Esperanto-Societo de Novjorko, *Novjorka Prismo*. Tiu okpaĝa bulteno, kiun redaktas Jim Medrano kun helpo de Thomas Eccardt kaj Nancee Medrano, estas teknike alloga kaj enhave interesa. La unua numero enhavas i.a. du novajn poemojn de Julius Balbin. Ni certe deziras longan vivon al tiu impona loka bulteno.

BAHAANOJ

La ĉijaran Bahaan Somerlenejon ĉeestis 150 bahaanoj. Ĝi okazis ĉe la Metodista Konferencejo en Bridgewater, TX, apud Fort Worth, la 23an ĝis 26a de aŭgusto. En la organiza vespero, inter la multaj diversaj anoncoj, la direktoro informis, ke ĉeestas Roan Stone, kiu multe laboris kun Lidia Zamenhof; kaj, se oni volas scii pli pri Lidia aŭ pri Esperanto, oni parolu kun ŝi. Vendrede, en la posttagmezo, s-animo Stone prelegis pri Lidia kaj pri Esperanto al 12 gejunuloj, kaj disdonis broŝurojn pri Esperanto al ĉiuj. Sabaton vespere, ĉe la lasta klaso, laŭ peto de la direktoro, s-animo Stone preĝis en Esperanto. Ĉeestis pli ol 150.

Raporto de Roan Stone

PREZENTO PRI ESPERANTO EN CUERNAVACA

de *d-ro Grant Goodall*

[*D-ro Grant Goodall, esperantisto jam de multaj jaroj kaj nova Vicprezidanto de ELNA, estas esploristo en la lingvistika fakultato de la Universitato de Texas (El Paso). D-ro Goodall parolas krom Esperanton ankaŭ tre flue la hispanan lingvon.*]

Dum la ELNA-Kongreso en Meksikurbo ĉi-julie, oni invitis Duncan Charters, Frank Helmuth, kaj Grant Goodall fari prezenton pri Esperanto en la *Centro Regional de Investigaciones Multidisciplinarias* [Regiona Centro pri Multfakaj Esploroj] en la urbo Cuernavaca, iom sude de Meksikurbo. Ĉi tiu esplorcentro estas

malgranda, prestiĝa parto de la Nacia Universitato de Meksikio, kaj tie kuniĝas eminentaj universitatanoj el diversaj fakoj. Ili multe interesiĝas pri Esperanto pro tio ke Isabel Nájera, longtempa esperantistino el konata movada familio, laboras tie kaj ĵus finskribis tezon pri Esperanto. Ili decidis profiti el la ĉeesto de multaj esperantistoj en la lando okaze de la nacia kongreso de ELNA (kaj la antaŭkongreso de UEA) kaj starigi tut-institutan seminarion pri Esperanto.

La titolo de la seminario estis "Universaleco de la Lingvo Esperanto." Tio estas, la celo de la prezentado ne estis simple provizi bazajn faktojn pri la internacia lingvo (tiaj faktoj estas jam sufiĉe vaste konataj tie), sed iom enprofundiĝi en specifa temo, ĉi-okaze la universaleco de Esperanto. Tiel ĉiuj tri prelegantoj preparolis diversajn flankojn de ĉi tiu temo. La unua, Grant Goodall,

komparis siajn proprajn spertojn pri la uzo de la angla kiel internacia lingvo kaj Esperanto. Frank Helmuth parolis pri sia uzo de Esperanto en sia familia vivo kaj en vojaĝado. Poste, Duncan Charters diskutis kelkajn interesajn psikologiajn diferencojn inter la lernado de Esperanto kaj la lernado de aliaj lingvoj. Grand Goodall kaj Duncan Charters prelegis hispane, kaj Frank Helmuth prelegis esperante, kun altnivela traduko fare de Charters. Je la fino de la sesio, estis sufiĉe vigla diskuto pri pluraj aspektoj de la temo. Ne temis nur pri demandoj, sed ankaŭ pri tre bone elpensitaj kaj pensigaj komentoj fare de la ĉeestantoj.

Estis entute proksimume 25 aŭskultantoj, inter kiuj troviĝis kelkaj tre konataj meksikaj intelektuloj. Ĉeestis ankaŭ kelkaj meksikaj esperantistoj, kaj anoj el la vidbenda servo de Esperanta Meksika Junularo tre profesiece surbendigis la tuton por posta utiligo.

EL LA CENTRA OFICEJO

Ĝis

This is my last article as the Director of ELNA's Central Office. I wanted to thank the many people with whom I have had the pleasure of working during the last four years, but when I started to make my list it seemed to go on without end. I was afraid that I might leave someone out, so I opted to focus on groups of people that have been outstanding supporters.

Clubs

One of the most exciting things that we have been able to accomplish was the establishment of the "Informpetinto Exchange Program" (IEP). Through this program local clubs and ELNA have forged a stronger, more supportive national organization. While the work has just begun and only the basis of a truly coordinated national structure has been laid, it is a good start and I hope that further programs will be instituted that will encourage the growth of both the national and local movement. Without the participation of all IEP clubs and their representatives this would not have been possible. To those club leaders that have joined the IEP I extend my appreciation. To those who have not yet done so, I extend the invitation to participate and help shape the programs that are available to clubs.

Particularly helpful has been the Berkeley Esperanto League (BEL), now known as the Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj. From the beginning of my work here at ELNA, BEL has been supportive, both financially (by donating a refrigerator to the office, greatly increasing the comfort of an otherwise spartan work space), and in terms of volunteer support. Certainly the work at the C.O. would not have been as productive without their support.

Board of Directors

Another important group that has been instrumental in the past four years of success is the Board of Directors. Without the encouragement, support, and approval of the Board we in the C.O. would not have been able to accomplish a tenth of what we have done.

General Membership

When considering the diversity of the Esperanto-speaking community in the United States, it is a miracle that we can come together in one organization and actually accomplish things. Most impressive, to me at least, is the tremendous amount of goodwill that ELNA members have expressed. That "goodwill" is the glue of our national movement. I encourage the membership-at-large to take a more active and direct role in promoting Esperanto. By and large the major achievements of our movement have been accomplished by individuals working on a local level.

Individuals

There are three individuals whom I would like to thank.

William R. Harmon, as commissioner of the Central Office, has been tremendously supportive. Bill has always shown a willingness to consider projects and proposals that "traditional wisdom" says will not work. I know for a fact that Bill has been surprised (as I have been) at just how successful some C.O. activities have been, but without his encouragement of experimentation and refinement of procedures we would have made little progress.

John Massey, ELNA's Treasurer, is a paragon of patience. Between two computer failures and the conversion to a new bookkeeping system, John has shown a tremendous volunteer spirit by giving hundreds of hours of his time. John is a little-thanked person because no one is aware of his work unless a problem

arises. ELNA is growing and I hope that John will stick around to help minimize the growing pains associated with that growth.

Ionel Onet came to work at the ELNA C.O. almost two years ago. As much as I am market-driven, Ionel is culture-driven, and the cultural perspectives that he brought with him have been a boon to the American Esperanto-speaking community. I feel very comfortable leaving the Central Office knowing that Ionel is staying and will continue to manage the ELNA Book Service, which is but one of his many tasks.

After the C.O....

Finally, during the past few weeks I have received many letters and phone calls asking what I am planning to do after I leave the C.O. My primary volunteer acts will be to assist in the transition to a new Director, with a focus on bookkeeping, and to finish coordinating the production of the third level of the correspondence courses that ELNA is currently offering. If time permits and the board expresses an interest, I would like to coordinate the "FOCUS ON LANGUAGE" workbook series and the Esperanto Flyer series that we proposed this past summer, both of which are developmentally and financially important to the Esperanto movement in the U.S. In any case, I plan to remain active in the Esperanto movement on the national level.

These past four years have been trying at times, but the rewards and personal satisfaction of having had the opportunity to work for such a worthy cause as Esperanto far outweigh any of its drawbacks. I wish the new Director of the C.O. the best of luck and hope that he or she will have the same positive experiences that I have had.

-Mark Stephens

From the President

de Angela Harlow

I would like to publicly thank the following for their contributions to ELNA and the Esperanto movement in the United States and elsewhere over the past few years:

Ken Thomson, President of ELNA 1987-1990. Ken is a hard worker, who selflessly, and often thanklessly, gave much time and effort to ELNA during his period in office despite severe and growing medical difficulties. Ken deserves our special thanks.

Prof. Duncan Charters, Vice-President of ELNA 1987-1990. In Ken Thomson's

enforced absence from the Congress in Mexico City, I saw Duncan at work masterfully presiding over both the Board and General meetings. Duncan has now agreed to serve as Chairman of the Nominating Committee for 1991.

Prof. James Cool, Commissioner for Youth 1981-1990. Jim has contributed to the growth of the unfortunately non-organized youth Esperanto movement; today ELNA has more than a hundred youth members, a record. Jim continues to be active in the field of Esperanto teaching.

Prof. James Fonseca, Member of the Board 1987-1990. Although Jim kept a relatively low profile, he actively supported the actions of the board, and undertook several valuable projects of his own.

William R. Harmon, Member of the Board 1987-1990. Bill's hard work for

ELNA is well known. The Board of Directors has asked him to continue as Commissioner for the Central Office, and I intend to make use of his special expertise in the international Esperanto movement; he has already served as ELNA's representative at the planning conference for the 1992 Pacific Esperanto Congress in Qingdao, and he has agreed to serve as one of ELNA's UEA Committee Members at the World Esperanto Congress in Bergen in 1991.

Last but not least, Mark Stephens, Director of the Central Office 1986-1990. During Mark's four years in office, ELNA's membership has doubled. I wish him well in his new endeavors, and hope that he will continue to be active in the field of national Esperanto publicity.

PASOJ

BALBIN

Poeto kaj poligloto Julius Balbin, aŭtoro de *Imperio de l' koroj* (Edistudio, 1989), estis elektita fine de la pasinta jaro kiel prezidanto de Usona Societo de Geolingvistiko. La societo, kiun fondis en 1965 fama lingvisto Mario Pei, celas kolekti kaj disvastigi ĝisdatajn informojn pri la distribuo kaj uzo de la lingvoj de la mondo, pri ilia relativa graveco laŭ politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj kriterioj, pri iliaj historio kaj interrilatoj. Ĝi eldonas propran revuon, *Geolinguistics*, alte estimatan en lingvistikaj rondoj de Usono.

Esperanto, Junio 1990, p. 136

D-ro Balbin estas ankaŭ lastatempe elektita vicprezidanto de la Esperantlingva Verkista Asocio. EVA kunligas esperantajn verkistojn, tradukistojn kaj eldonistojn. Ĝi estis fondita de Tibor Sekelj en 1983; ĝia sidejo troviĝas en Jugoslavio.

Novjorka Prismo, Septembro 1990

BAKO

Sandor J. Bako (1915-1990) estis la kultura kaj lingvistika aŭtoritato de la Losaŝelesa Esperanto-komunumo dum la pli multaj el ĝiaj aktivaj jaroj. Li estis flua parolanto kaj skribanto de Esperanto, kaj lia hungara deveno estigis supozata se ne efektiva parenceco kun la adorata verkisto-poeto Kalman Kalocsay. La dulingva (Esperanto-Angla) novelaro *Tiaj Ni Estas / Behold You and Me* de Sandor estigis en niaj grupanoj senton de fierco krom senton de subteno kaj sekureco, ke en realeco tute kompetenta Esperantisto loĝas en la "Losanĝelesa antaŭurbo" de Esperantujo. La 5an de majo kelkaj EALA-anoj partoprenis memorigan diservon en la hungara lingvo ĉe la Preĝejo St. Stephens, Losanĝeleso. Sandor Bako kaj ties

kontribuo al la aŭtenteco de Esperanto en Losanĝeleso meritas resti memorataj.

Laŭ *Esperanto Association of Los Angeles Newsletter*, 1990(8)

CHILDS-MEE

Unu el la plej amataj kaj influaj pedagogoj de la Esperanto-movado mortis pro kancero la 16-an de majo en Kibworth, Leicester (Anglio).

Jam talenta lingvoinstruisto, Audrey C.E. Childs-Mee eklermis Esperanton en 1962 kaj rapide entuziasmiĝis. Post deko da jaroj, en 1973, ŝi translokiĝis kun sia edzo Lawrence Mee al Roterdamo por posteniĝi en la Centra Oficejo de UEA. Dum pluraj jaroj ŝi redaktis la Jarlibron kaj valore kontribuis al la funkciado de la oficejo. Poste ŝi daŭre loĝis en Roterdamo kaj ofte venis por volontule labori.

La instruado de Esperanto okupis pli kaj pli centran lokon en ŝia vivo. La Ĉe-metodon ŝi revivigis kaj adaptis al modernaj kondiĉoj, verkante gravan metodologion (*La baza kurso en Esperanto*, 1978) kaj la furore sukcesan *Saluton! Esperanto aŭtodidakte* (1983), kies kvin eldonoj jam ludas signifan normdonan rolon tra la mondo. En siaj seminarioj por Ĉe-instruistoj, organizitaj kun Internacia Esperanto-Instituto, ŝi insistis pri plej altaj lingvo- kaj instruniveletoj. En la lastaj jaroj ŝi ofte vojaĝis, i.a. al Aŭstralio, Pollando, Usono, Francio kaj Bulgario, transdonante sian entuziasmon kaj fakan scion. Pluraj ELNAanoj memoras ŝin kiel kompetentan kaj efikan instruiston dum la Somera Kursaro ĉe San Francisco Ŝtata Universitato en 1989. En 1988 ŝi estis elektita kiel ĝenerala sekretario de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Inter ŝiaj multaj interesoĝi troviĝis dum pluraj jaroj Espermensa, movada branĉo de la asocio por altinteligentuloj. Ŝi okupiĝis ankaŭ pri infana literaturo, aŭtorante *La geknaboj de Greziljono* (1981) kaj verkante recenzojn por

diversaj revuoj. Ankoraŭ neeldonita estas ŝia traduko de aŭstralia klasikaĵo, *La magia pudingo*.

Audrey Childs-Mee estis unu el niaj plej vervaj kaj valoraj aktivuloj internaciskale. Ne nur ŝiaj multaj amikoj, sed ankaŭ la movado mem, profunde sentas ŝian forpason.

Iomete adaptita de *Esperanto*, julio-aŭgusto 1990

HAUTALA

Genevieve Hautala de Honolulu, longtempa ELNA-ano, forpasis la 31an de majo, 1990, pro kancero. Ŝi loĝis en Havajio preskaŭ 40 jarojn kaj estis emerita instruisto pri librotenado kaj ankaŭ dommakleristo. Ŝi estis dulingve kapable en la finna kaj angla, kaj parolis ankaŭ la hispanan, kiun ŝi utiligis dum iama restado en Hispanujo. Post la emeritiĝo ŝi instruis la anglan al enmigrintoj al Usono. Esperantistiĝinte en 1971, ŝi partoprenis la somerajn kursarojn en San-Francisko en 1978 kaj 1989. En somero de 1989 ŝi ankaŭ festis sian 80-jariĝon per preskaŭ trimonata restado en Bydgoszcz, Pollando, helpe de Esperanto-VojaĝServo kaj Esperantotur.

Reginald Jaderstrom

STONE

Multajn gratulojn al Roan Orloff Stone okaze de ŝia 84a datreveno! Roan estas la tradukinto de *La Profeto* de Ĝibrano (jam en sia tria eldono, ĉe Fonto), kaj dum multaj jaroj estas unu el la ĉefaj fortoj malantaŭ la Bahaa Esperanto-Ligo. Pro vidkapablaj problemoj, jam estas malfacile por ŝi legi leterojn, sed treege feliĉigus ŝin se ŝiaj multaj geamikoj sendus al ŝi kasedleterojn. Ŝia adreso: Roan Stone, Rt. 1, Box 46C, Hallsville, TX 75650.

Daŭrigota sur paĝo 14

ESPERANTO-AKTIVECOJ EN ORIENTO KAJ OKCIDENTO

de Yosimi Umeda

[Yosimi UMEDA, dum multaj jaroj eksterlanda ano de ELNA, estas ankaŭ jam delonge konata en la internacia Esperanto-Movado kiel unu el la internaciaj motoroj de la Movado en Azio. Dum pluraj jaroj li servis kiel Vic-Prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio. Ĉi tiu artikolo estas la teksto de prelego, kiun s-ano Umeda faris okaze de la 38a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, ĉe Kioto, la 1an de julio 1990. Sur la manuskripto troviĝas la subtitolo: "—kun aparta konsidero pri aktualaj problemoj—"]

Jen estas mia pasporto. Se vi volas, vi povas rigardi ĝin kaj konstati, kiom da stampoj mi ricevis en tiu ĉi pasporto. Jam abundas stampoj de diversaj landlimaj kontrolejoj, kaj mi devis peti la aldonajn blankajn paĝojn por ricevi novajn stampojn de vizitotaj landoj dum la 5-jara valida periodo. Tio signifas, ke mi tiel ofte vojaĝas eksterlanden. Pli ol 50 landojn sur la terglobo mi jam vizitis. Kial mi tiom multe vojaĝas, eble vi ŝatus demandi?

Preskaŭ duonon de la jaro mi forestas de Japanio. Por kio mi vojaĝas tiel ofte? Vi tuj komprenas, ke mi vojaĝas ĉefe pro Esperanto. Mia vojaĝo parte ligiĝas kun iaj komercaj kaj aliaj celoj, sed en la lastaj ses jaroj mia vojaĝo estis ĉefe ligita al Esperanto-movado kiel la vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio. Surbaze de tio ĉi, mi nun provas analizi kelkajn aspektojn de la aktivecoj de esperantistoj en Oriento kaj Okcidento kun aparta konsidero pri aktualaj problemoj en la nuntempa Esperantujo ĝenerale.

Novembre de 1988 la redakcio de *Budapeŝta Informilo* invitis min kontribui por la *Informilo* per miaj opinioj pri la levitaj demandoj. Ili sendis la saman liston al ĉiuj tiamaj estraranoj de UEA. Eble per tio ili volis sondi la eblan liston de la kandidatoj por la nova estraro elektota en 1989. Mi estis la plej frua respondinto, ĉar mi ŝatas akuratecon,

kiun postulas la komercista medio por plenumi la aferojn, por kiuj mi akceptis labori. Ke mi konsentas fari iun laboron, mi certe plenumas kiel eble plej akurate kaj efike. Laŭ la antaŭa preleginto, d-ro Teturoo KAWANISI, kiu prezentis la homajn karakterojn laŭ la medicina analizo per du kategorioj A kaj B, mi kredeble apartenas al A, same kiel d-ro Zamenhof. Mi nun permesas al mi prezenti al vi, kiel mi respondis al la demandoj de *Budapeŝta Informilo*.

Unua demando temas pri tio, kiel mi pritraktas la historian gravecon de pasintaj 80 jaroj de UEA. Mi respondis jene: "80 jaroj de UEA-historio estas tre gravaj en la senco, ke Esperanto kiel internacia lingvo devis de la komenco havi organizitan formon de disvastiga laboro. Zamenhof estis genia ne nur kiel kreinto de la lingvo internacia, sed pro tio ankaŭ, ke li tre bone komprenis la forton de la organizita laboro de la homoj, t.e. movado. Kiel konate, li insistis, 'por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia'. Des pli gravis, kaj ankoraŭ gravas, la movado internaciorientita por disvastigo de Esperanto, ju pli oni volis ligi ĝin kun aldonaj ideoj valoroj kiel paco, frateco kaj justeco inter popoloj de la mondo. UEA en sia 80-jara historio plenumadas tiujn antaŭvidojn kaj esperojn, eĉ se ne kontentige, en diversaj praktikaj kaj aktualaj manieroj. Ni povas alte taksi la paŝojn de UEA, ekzemple, en la malfacilaj jaroj dum la militoj, kie Esperanto kiel neŭtrala lingvo kaj esperantistoj kiel adeptoj de humanecaj celoj funkciis tre bone. Nenio en la mondo troviĝas io, kion oni povas nomi perfekta, kompleta, kaj UEA ankaŭ ne estas escepto, se ni konsideras la kreskritmon de la membraro, kio ofte reflektas la rezultojn de la faritaj laboroj."

La dua demando: kiel vi opinias pri la nuna stato de la monda Esperanto-movado? Mi respondis: "La nombro de esperantistoj ne kreskas tiom okulfrape kiom oni supozas per la potencialo de

Esperanto kiel internacia lingvo. Nenie en la mondo ekzistas 'Esperantujo' kiel 'ŝtato', sed ĉie troviĝas 'Esperantujo' kiel 'grupeto' en la mondo, kie kolektiĝas esperantistoj, tiel ni parolas al la eksterstarantoj pri nia movado. Se ni tamen strikte observas la difinon de la 'esperantisto', laŭ tio ke tiu ĉi estas la homo, kiu ellernis kaj praktike uzas la lingvon Esperanto, mi demandas min, kiomgrade ni povus fanfaroni pri nia 'monda Esperanto-movado', ĉar ĝi ankoraŭ restas gvidata laŭ 'eŭropismo' aŭ 'eŭrop-centrismo'."

Trie la redaktoro demandis: kiuj estas ĉefaj agadterenoj, kiuj nepre bezonas prioritaton? Mia respondo estis konciza, sed serioze pragmatisma. "Konstrui kaj firme establi bazon por disvastigi la veran celon de Esperanto necesigas grandajn monrimedojn. Por plifortigi la financan bazon ni devas kunigi niajn limigitajn fortojn. Nia prioritato estas trafe kuraci la 'arteriosklerozon' de niaj lokaj, landaj kaj internaciaj laborkorpoj.

Nu, mi antaŭeniru. Unu el la aktualaj problemoj en Esperanto-movado rilatas al la aĝo. Esperanto jam travivis pli ol 100 jarojn, kaj do estas tute nature ke ni havas grandaĝulojn en nia tendaro. Tiu aĝa demando estas tre grava, mi pensas. Temas pri generaciaj problemoj ene de Esperanto-movado, nome la heredado de laboroj trans la generacioj. Laŭ mia observo, ekzemple, en Eŭropo tre multaj Esperanto-organizaĵoj estas gvidataj kaj administrataj de relative maljunaj homoj. Ĉu vi konsentas, aŭ ne, sed mi vidas, ke plejparto estas maljunuloj, eksjunuloj, kiuj estas organizitaj kaj apartenantaj al iu grupa formo. Ekzistas sufiĉe viglaj junularaj grupoj de loko al loko, sed ni ne sentas ilin integra parto de la movado, kiel devus esti la rilato inter UEA kaj TEJO.

Unue ni difinu la kriterion de junulo. Laŭ la nova regularo de TEJO aprobita de la Komitato de UEA en 1989, oni akceptas la junulojn ĝis inkluzive de 30 jaroj. Ni do difinu ĝenerale la junulecon

ĝis 30 jaroj.

Tra Esperantujo landaj asocioj ne tiom bone funkcias, kiom oni atendas. Kial? Ĉar la mezaĝaj homoj, inter 31 kaj 60 jaroj, mankas kvante preskaŭ ĉie, pro la lastaj militoj, pro la karieraj taskoj, kaj pro la familiaj ŝarĝoj, kiuj katenas tiuaĝulojn vole-nevole al siaj propraj medioj kaj ne permesas al ili flankokupiĝi. Ili ne povas sindediĉe labori por la Esperanto-movado. Ili do ne povas esti kernoj de la movado, ofte ĝis ili emeritiĝas. Tial, la aĝdiferenco inter junulara grupo kaj landa aŭ regiona asocio estas ofte tro granda baro. La landa asocio postulas, aŭ volas fari diversajn agadojn, sed ili ne havas sufiĉe da soldatoj, kiuj kapablas en fronto kuraĝe kaj bone labori.

En novaj landaj asocioj, ekzemple en Ĉinio kaj Koreio estas multe da gejunuloj, kiuj venas en la movadon. Same en Bharato (Hinda Unio), en Pakistano, kaj en Irano estas gejunuloj, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj tuj komencas labori por la movado. Ili volas engaĝiĝi en la laboro por la lingvo Esperanto, profiti de ĝi kaj sukcesi en sia vivo pere de ĝi. Tio ĉi estas grandioza afero, laŭ la ĝisnunaj pensmanieroj de la esperantistoj el maljuna generacio.

Tie ĉi mi raportos al vi pri kelkaj aspektoj de laboroj aŭ deziroj de gejunuloj en aziaj landoj. En Ĉinio mi scias, ke lernemo de Esperanto estas furioza tra la vasta lando. Oni diras, ke la nombro de la lernantoj de Esperanto en tiu lando proksimumas kvarcent-mil. Ĉu vi povas imagi 400,000 lernantojn? Ne temas pri nuraj 400, sed miloble pli granda.

Kial ĉinaj gejunuloj lernas Esperanton? La respondo estas simpla, ĉar Esperanto donas al ili novan informon, novan scikonon, kaj tiel malfermas la fenestron al la mondo. Ili atendas de Esperanto novan fazon en sia propra vivo. En 1920-aj jaroj Esperanto estis tre vigla en Ĉinio kiel movado de nova, revolucicela agado, tre alloga por la gejunuloj subpremataj. La nunaj gvidantoj de la ĉina registaro ja scias, kaj memoras la vortojn de Maŭ Zedong, kiu diris, ke Esperanto estas lernenda kaj lerninda, se ĝi utilas por popola revolucio. Tial, Esperanto estas subtenata de la ĉinaj ŝtataj instancoj. Jam

en 1950, unu jaron post la starigo de la nova Ĉina Popola Respubliko, la Eduka Ministerio sendis la dekreton al la altgradaj lernejoj, ke Esperanto povas esti instruata kiel la dua fremda lingvo aŭ unu el la elekteblaj lingvoj. Tio estis ankoraŭ konfirmata en 1985 antaŭ la 71-a U.K. en Pekino.

La ĉinaj studentoj povas verki la tezon kaj disertacion en Esperanto, aŭ aldoni Esperanton kiel objekton de instruista kariero. En Ŝanhaja Universitato de Studo pri Internaciaj Aferoj okazis konstanta kursaro por Esperanto-instruistoj jam de 8 jaroj. La studentoj venas tien el diversaj provincoj de Ĉinio. Ili estas jam lingvo-instruistoj de iuj fremdaj lingvoj, angla, japana, franca, tgermana, aŭ iu alia. Post finiĝo de la 10-monata intensiva kursaro en Ŝanhajo ili reiras al siaj universitatoj aŭ similaj altgradaj lernejoj kaj komencas aldone instrui Esperanton, kaj tiam ili ricevas iom pli da aldona salajro por Esperanto-instruado. Tio per si mem estas profitiga afero de Esperanto-lernado.

Ankoraŭ alia ebleco utiligi Esperanton estas labori ĉe la turismaj servoj kiel ĉiĉeronoj paralele kun aliaj lingvoj, kvankam esperantistaj turismaj grupoj al Ĉinio ne estas tiom grandaj kaj oftaj kiom por aliaj lingvanoj. Turismo parenteze estas granda fonto de enspezoj por la Esperanto-movado, se ni komerciste ekspluatas tiun eblecon, simile al la Esperantotur sub la ŝildo de Pola Esperanto-Asocio, pri kiu mi ne povas tie ĉi detale priskribi sed kiu tre vigle kaj profite aranĝadas la turismajn grupojn travojaĝi dekojn da landoj. Mi jam prezentis tiujn praktikajn aspektojn de Esperanto-agadoj en la Orienteŭropaj landoj okaze de la 39-a Kongreso de Esperantistoj en regiono Kantoo ĵus antaŭ du semajnoj.

Tiamaniere, en diversaj partoj de la mondo, precipe inter triamondaj landoj, gejunuloj interesiĝas pri Esperanto ĉefe pro praktikaj celoj, ne nur kiel ilo por mongajno sed ankaŭ por diversaj praktikaj utilecoj.

Sekvas la demando pri la nombro de esperantistoj. Pri la internacieco de iuj lingvoj oni ofte gravigas la nombron de la uzantoj. Homoj ofte demandas, kiom da esperantistoj troviĝas en Japanio, aŭ en la mondo. Ĉu vi povas trafte respondi al tiu

ĉi demando? Nenie estas klara statistiko. Sed mi klopodas mencii proksimuman nombron de la organizitaj esperantistoj, por citi la nombron en Japanio.

Japan Esperanto-Instituto estas la plej granda enlanda organizaĵo de esperantistoj en Japanio, havante proksimume 1,200 membrojn. Ekzistas tra Japanio ankaŭ aliaj organizaĵoj, kiuj havas pli-malpli inter 200 kaj 500 membrojn. Laŭ tiuj membronombroj mi povas kalkuli, ke en Japanio estas ĉirkaŭ 4,000 esperantistoj, kiuj apartenas al tiuj grupoj. Pri aliaj mondopartoj sama kalkulmaniero povus validi, sed neniu povas ekzakte scii la nombron de esperantistoj, eĉ en sia propra lando kaj des pli tio ne eblas por la tuta mondo.

Tamen, la eksterstarantoj ofte gravigas la nombron de la uzantoj de iujajn lingvoj por nomi internacian aŭ komunan lingvon, kiel la angla, rusa, hispana kaj araba. Se temas nur pri la nombro de la uzantoj, la ĉina lingvo devas esti la unua plej granda lingvo en la mondo, ĉu ne? Kaj pri Esperanto ni ne povas fieri ĝian grandlingvecon, se temas pri la nombro de la uzantoj.

Alia aktuala problemo en la Esperanto-movado rilatas al la agadmanieroj laŭlandaj. La agadmanieroj diferencas de lando al lando, de regiono al regiono, kaj laŭ la partoj de la terglobo. Ni ne povas unuecigi la agadmanierojn de Esperanto-movado tra la mondo. Esperanto-movado devas kaj povas havi diversajn aspektojn de la agadkampoj laŭ la cirkonstancoj kaj situacio de unuopaj landoj, regionoj kaj mondopartoj de la nordo, sudo, oriento kaj okcidento.

Tie ĉi mi mallonge traktu la situaciojn de Esperanto-movado en Eŭropo, laŭ la orientbloka tiel-nomata socialisma parto, kaj laŭ la okcidenta tiel-nomata libera kapitalisma parto. Unu el la karakterizaĵoj de orienteŭropaj aktivecoj de esperantistoj estas tio, ke, kvankam la nombro de esperantistoj grave superas en tiu parto de la mondo, pro devizaj demandoj, pro transpagaj malfacilaĵoj, tiom da ili ne povas aliĝi al internaciaj organizaĵoj, kiel UEA. Pola Esperanto-Asocio, ekzemple, havas tra Pollando pli ol 30,000 registritajn membrojn, kiuj tamen ne povas esti samtempe la membroj de UEA. Similajn ciferojn de la membraro ni trovas en aliaj socialismaj

lanodj kiel Bulgario, Hungario, Sovetunio kaj ankaŭ Ĉinio. Aliflanke, grandan parton de la Esperantolingvaj elsendoj okupas la radiostacioj el tiuj socialismaj landoj, kompare al la radiostacioj el aliaj partoj de la mondo.

Kontraste al tio, en okcidenta parto de Eŭropo, dank' al la intima malgrandeco de nombro, esperantistoj ĝuas tre oftajn eventojn, en formo de semajnfinaj renkontiĝoj, kelk-landaj komunaj aranĝoj, kulturaj interŝanĝoj per-Esperantaj, kaj simile, kiuj organiziĝas konstante kaj senĉese tra la jaro. Vi ja rimarkas tiajn eblecojn laŭ la kalendaroj de Esperanto-aranĝoj aprigataj en diversaj revuoj, kiel *Heroldo de Esperanto* kaj aliaj. Tio estas vere enviinda afero por japanaj esperantistoj, kiuj ne povas ĝui tiajn aranĝojn.

Per tiuj supraj ekzemploj vi povas konstati, ke Esperanto tre bone funkcias en Eŭropo, ĉu oriente ĉu okcidente, kiel lingvo vivanta kiel interpopola komunikilo. Tiun maturecon ni ankoraŭ ne povas senti en Japanio je nia granda bedaŭro.

Eble oni atendas tro de la gvidorgano de UEA. Mi opinias, ke UEA ne povas gvidi per unuecigita agadplano ĉiujn landajn asociojn, krom doni iujn gvidliniojn laŭ kiuj unuopaj landaj asocioj disvolvu la laborojn konforme al sialandaj bezonoj de la internacia kaj interpopola komunikado. Ni ne devas atendi tro multe de UEA kiel sola internacia gvidorgano. Tiurilate mi ne sentas malkontenton pri la japana Esperanto-movado, kiu prezentas iusence unikajn aspektojn de la aktivecoj.

Esperanto funkcias kiel katalizo. Esperanta kulturo disvolviĝas sur multaj naciaj kulturaj valoroj. Laŭ mia kompreno internacia kulturo estas amasigo de kaj filtrigo tra diversaj naciaj kulturoj. Ni uzas Esperanton kiel ponton por interŝanĝi tiujn diversajn kulturajn valorojn inter diversaj mondopartoj. Kiam mi prelegvojaĝas en iuj landoj mi uzas Esperanton por prezenti la japanan kulturen valoron. Inverse, mi lernas pere de Esperanto alinaciajn kulturojn. Tiamaniere esperantistoj proprigas al si internacian kulturon aŭ supernacian kulturen valoron. Tie ni povas trovi la rolon de Esperanto.

Mi devas nun pritrakti tre gravan

problemon en la Esperanto-movado, tio estas la financaj rimedoj. Niaj esperantistaj laboroj multe dependas de la financaj rimedoj. Ĉiuj laboroj de UEA, de unuopaj landaj asocioj, kaj ĉiuj grupoj, devas baziĝi sur financaj rimedoj. Ni certe bezonas ian financan bazon por antaŭenigi niajn aktivecojn. Sed, ĉu ni vere sekvas la ekonomian principon, nome, ĉu ni aplikas la fundamentan rilaton inter 'bezono' kaj 'provizo' en la laboroj de Esperanto? Mi povas kompari tiun principon kun rilato inter varo kaj valoro. Esperanto estas varo, kiu naskas la valoron por tiu, al kiu la varo utilas. Ni povas vendi tian varon kaj ricevi monon kiel valoron por tiu utila varo. Aliflanke estas rilato inter investo kaj profito. Ni elspezis monon por aĉeti la varon nomatan Esperanto, antaŭvidante ian profiton de ĝi. Mi iom prezentu aktualajn formojn.

Mi denove citas la ekzemplon el aziaj landoj. La mezaĝaj laboristoj en Ĉinio ricevas monatan salajron proksimume egalvaloran al 7,000 japanaj enoj. Tiu sumo sufiĉas por vivteni sin kun eble 2 aŭ 3 familianoj. Laŭ la propocio de la salajro, ĉinaj junuloj devas investi egalvaloron de 1,000 aŭ 2,000 japanaj enoj por lerni Esperanton. Tio estas tre granda parto el la enspezo, ĉu ne? Tiel ili investas kaj atendas ricevi ion valoran de Esperanto, ne rektan monan rekompencan, sed intelektan gajnon en diversaj formoj.

Ankaŭ en Bharato la situacio estas simila. Ĉu vi povus imagi, ke ili korespondas kun alilandaj esperantistoj pagante dek procentojn de siaj monataj enspezoj por necesaj poŝtmarkoj, averaĝe? Pro tio, se iu el vi ne reagus al ili akurate, poŝtrevne, ili tre ĉagreniĝas kaj eĉ deprimiĝas pri la valoro de Esperanto kiel ponto inter diversaj popoloj. Por japano unu aerpoŝta korespondajo ne estas tiom granda elspezo kiom por ĉinoj kaj bharatanoj. Bonvolu bone pripensi tiun fakton.

Mi pardonpetas pri tio, ke mi tre sporade montras al vi diversajn aspektojn de la Esperanto-movado en la mondo. Nun mi ŝatus paroli ankaŭ pri la realismo kaj praktikismo. Ĉu junuloj estas realistoj? Almenaŭ mi mem eklernis Esperanton komence kiel idealisto kaj post plena utiligo de Esperanto kiel

